## Malnovroma aĝopiramido

La morto estis en la antikva Romo ĉie ĉeesta. Ne nur ĉar la honorigo de la mortintoj grave rolis, sed ankaŭ ĉar la vivo-ekspekto tiam estis tre malalta. Pli ol 40 % de la suĉbeboj kaj infanoj mortis dum la unua vivojaro. Kiam infano atingis la aĝon de 5 jaroj, tiam – statistike – ĝi havis vivoekspekton de 42 jaroj. Ĉe tiu, kiu postvivis la 20-an jaraĝon, la vivoekspetado pliiĝis al 50 jaroj. La averaĝa aĝo en la urbo Romo mem estis malpli ol 25 jaroj. La proporcio de pli-ol-40-jaruloj estis 25 %, kaj pli ol 60-jaraĝa estis nur 6 % de la loĝantoj. De kio ni tion ĉi scias? Nu, la mortado en Romo, ne alie ol ĉe ni hodiaŭ, estis firme konektita kun burokratio: ĉiu morto-kazo/mort-okazo devis esti raportita al la mortoregistrejo. (2008-10-31)

## *α... β...*

La unua alfabeto estis semida kaj estiĝis ĉ. 1700 a.K. en la regiono de Palestino kaj Sirio. Ĝi konsistis ekskluzive el konsonantoj, 22 laŭnombre. La nomoj de la skribosignoj konformis kun la signifoj de objektoj, temoj kaj aferoj el la ĉiutaga vivo. La semida litersinsekvo estis, interalie, modelo por la fenica alfabeto, kaj el tiu ĉerpis, ĉ. 1000 jarojn a.K., la grekoj. Tiuj unuafoje enkondukis literojn por vokaloj, sed cetere preskaŭ nenion ŝanĝis laŭ la litersinsekvo, ĉar la skribosignojn oni samtempe uzis kiel kalkulsignojn kies intersekvo certe estis fiksita. La *α(alfa) β(beta)* ..., mallonge do alfabeto, estis poste transprenita de la grek-entuziasmiĝintaj etruskoj, kaj de tiuj ĝin prenis la romianoj por la latina lingvo. Alfabetrilate ni do estas iliaj "abc-lernantoj". (2007-19-12)

## Honorigado kaj (mal)honoro

Li estis unu el la plej estimataj britaj sciencistoj, la psiĥologo *Cyril Burt* (1883-1971), kiu pro siaj esploroj estis nobeligita. Li pruvis, ke infanoj heredas sian inteligentecon de la gepatroj, kaj nur ekstreme malgranda parto de tio estas la rezulto de edukado. Tio tre konvenis al certaj politikistoj. Sed nelonge post lia morto oni malkaŝis gravajn neveraĵojn en la datenoj: fikciajn inteligentec-kvocientojn de elpensitaj personoj, dubindan amason de disigite elkreskintaj ĝemeloj k.t.p. Oni ankaŭ trafis du nur surpapere ekzistantajn kunlaborantinojn de *Burt*, en kies nomoj li amasigis gloradon sur si per memverkitaj artikoloj en renoma fakĵurnalo, kiun li mem eldonis. Tie li ankaŭ presis de li skribitajn legantoleterojn, kiujn li poste – nun sub sia propra nomo – povis ataki por ellasi sian koleron. Estas interese, ke certaj kolegoj de *Burt* de tempo al tempo provas honorsavi lin… (2008-10-30)


# Scienca Revuo Vol. 60 (2009) (3) / n-ro 218

**Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**
**Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/**

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.
Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj
Laserkopiita: Septembro 2009 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30 DE - 37269 Eschwege*/Germanio
Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj


Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare
pagebla pere de via
a) landa peranto (resp. landa delegito)
aŭ rekte al
b) ISAE-konto ĉe UEA/*Rotterdam* (NL): isae-z *) *vd. sube*
IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF
t. e. por ISAE-anoj el Germanujo: vi pagu (anstataŭ kiel pli frue al ISAE/Sachs) al la germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en *Köln*, Germanio, kun indiko "ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z"

### Landaj Perantoj de ISAE

| | | |
|---|---|---|
| Aŭstralio | *Libroservo AEA*<br>*143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | *<libroservo@esperanto.org.au>* |
| Brazilo | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)*<br>*C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| Britio | *S-rino Viv O'Dunne*<br>*p.a. Esperanto Asocio de Britio (EAB)*<br>*Station Rd., Barlaston*<br>*Stoke-on-Trent, Staffordshire, ST12 9DE Britio* | *<eab@esperanto-gb.org>* |
| Finnlando | *S-ino Päivi Saarinen*<br>*Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo* | *<paivi.saarinen@iki.fi>* |
| Francio | *S-ro J.Charles Trébouet*<br>*Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | *<trebouet.bohere@club-internet.fr>* |
| Irlando | *S-ino Joy Davies*<br>*9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | *<noviresp@eircom.net>* |
| Korea Resp. | *S-ro Cho Sung Ho*<br>*Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| Norvegio | *Eldonejo Esperanto*<br>*Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | *<hara-ryg@online.no>* |
| Pollando | *S-ino Magdalena Tatara*<br>*Košmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka* | *<mtatara@gmail.com>* |
| Svedio | *S-ino Lisbeth Andréasson*<br>*Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| Usono | *Esperanto-USA*<br>*1335 Stanford Ave, Suite 300, Emeryville CA 94608, USA* | *<eusa@esperanto-usa.org>* |

***) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) (kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**
**Prof. Dr. R. Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio**
**Tel. xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>**